Skövde la 9.7.47.

Amiko,

Je la 19.20 h. hodiaú`mi aŭskultis "Eĥon de l' tago". Oni demandis al unu el la ĉefarangantoj de la CIOS-kongreso: "Kiel oni arangas kongreson"? La radio-oficisto enkonduke diris, ke CIOS estis la plej granda - aŭ almenaŭ unu el la plej grandaj kongresoj en Svedujo, ĉar estis 1200 partopren. kaj inter ili 700 eksterlandanoj.

Ĉu oni forgesis jam la Esp.-kongreson 1934?

I.a. oni rakontis, ke CIOS-kongreso postulis 125 dungitajn oficistojn kaj krome multaj libervolaj kunlaborantoj. Tio estas necese.

Eble vi mem aŭdis? Nu, pri la 33:a vi skanianoj certe zorgos. Sed, ĉu vi havos 125 dungitojn? Tamen vi certe montros bonegan rezulton kaj ebligos al Radiotjänst denove anonci "la plej granda.." kun tiom kaj tiom da libervolaj kunlaborantoj....

Form. 192.

Mi nur notis preterpase...

Åberg.

Hanssons